

"SABADELL ESPERANTISTA"  
BULTENO DE

# CENTRO DE ESPERANTO SABADELL



Papa Pius XI, 130 - Apartat 407 - Tel. 716 36 33  
Prezidanto: Llibert Puig - Redaktoro: Òscar Puig

---

JUNIO-AÛGUSTO 1981 / N-ro 158 / 25A JARKOLEKTO

---

SOJLE  
DE LA

## 23<sup>a</sup> KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO



MOLA  
26-27-28-29

## NIA LIBROSERVO

Ni prilaboras novan ĝisdatigitan libroliston kun la espero ke ĝi aperu okaze de nia ĉi-jara Renkontiĝo en Moiã. Dume ni informos per nia bulteno pri lastaj novaĵoj en la internacia libromerkato.

Plena Analiza Gramatiko (Kalocsay-Waringhien, 608 p.) Ni disponas pri malgranda, sed konstanta stoko de ĉi tiu fundamenta verko, aĉetebla po 2.000 p-tojn.

Plena Ilustrita Vortaro (nova 3a eldono) Sendube la plej populara kaj uzebla verko de nia movado sed ĝi ankaŭ rekordas kiel la plej multekosta. La nova prezo de ĉi lasta eldono estas 4.400 p-toj.

La Dia Komedio (2a nova eldono, 55 + 709 p., ilustrita, 28 cm., Serio Oriento-Okcidento)

Tre luksa dulingva eldono kun paralelaj tekstoj en Esperanto kaj la itala. Pli ol cent tutpaĝaj ilustraĵoj de Sandro Botticelli. Pluraj enkondukaj tekstoj, multaj klarigaj notoj. La monde konata ĉefverko de la granda itala poeto. Versa traduko, sen rimoj. Prezo: 3.700 p-toj.

## 73a Franca Kongreso de Esperanto

La nordkataluna ĉefurbo Perpinyà gastigis la ĉi-jaran Francan Esperanto-Kongreson kaj ĝia proksimeco altiris la ĉeeston de proksimume 40 sudkatalunojn.

Tute ne eviteble ĉi-tiu raporto prezentos palan bildon de la Kongreso, ĉar la subskribinto ĉeestis nur du kongrestagojn.

La Kongreso disvolviĝis plejparte en la Palaco de Kongresoj adekvate ekipita. Ĉe la granda halo oni distribuis la dokumentojn kaj bone provizita libroservo sin oferis je la avidemo de la gekongresanoj.

Resaluti la LKK-Prezidanton kaj plurjaran amikon s-ano Renat Llech Walter estis unu el la plej ĝojigaj momentoj de tiu brila sabatmateno. Daŭre ni renkontis konatojn de la franca movado kaj amikojn sudkatalunajn kun kiuj ni ĝoje babilis ĝis la komenco de la oficiala inaŭguro.

Ĉe la prezida podio sidiĝis (vidu foton) dekstre-maldekstren de la leganto, patro kaj filo Despiney; Chicot; Texier (Prezidanto de UFE); Lluís Lliboutry (Helpurbestro); Renée Triolle (Sekretariino de UFE); Renat Llech Walter (LKK-Prezidanto); Jean Guillaume kaj Llibert Puig.



Mi estis speciale invitita de la LKK saluti la Kongreson nome de la sudkataluna movado kaj tion mi faris kun emfazo pri la ekzisto ĉe ni de KEA kaj ĝiaj celoj.

Mi scivolis kiamaniere niaj francaj najbaroj organizas Kongreson ĉar nur per komparado oni povas plibonigi la propran. La inaŭguro tuj ŝokis min ĉar ĝi disvolviĝis tute malsimile al tiuj de la hispanaj kongresoj. Mankis la tradicia salutado de la diversgrupaj reprezentantoj, mankis ĝenerale tiu soleneco de la inaŭguro. Post la sinsekva saluta interveno de la sidantoj ĉe la podio, prenis la parolon la Prezidanto de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) s-ro J.L. Texier kiu elokvente prezentis novan reklamsistemon preparitan de UFE kun la helpo de reklamprofesioj, kiu espereble bone sukcesos ĉar ĝi estus imitebla ĉe ni se ni atingus de UFE la oficialan rajtigon. Tamen en tio konsistis la tuto de tiu inaŭguro, certe sufiĉe malsolena sed utila.

La praktika sinteno de la UFE-Estraro montriĝis denove je la publika prezento de la Klubo 87. Temas pri vasta kaj laŭgrada agadplano de nun ĝis 1987 (centjara datreveno de Esperanto). Ĉar la projekto ŝajnas tre rekomendinda, KEA (Kataluna Esperanto-Asocio) petos detalan informon de UFE pri ĝi kaj siavice ĝi informos ĉiujn Esperanto-Grupojn en Katalunio.

Kiel fari Esperanton utila al la esperantistoj? estis la temo de publika diskuto dum la Kongreso. Evidentiĝas nerefutebla bezono en ĉi-tiu kampo kaj la francoj ankaŭ surtabligis ĝin kun la celo pluesplori tiucele.

En speciala kunveno oni prezentis kaj klarigis la novan kaj modernan lernilon Metodo - 11 ĵus eldonita de UFE kaj la aldonan gvidlibron por la instruonto. Ni ĝoje konstatis ke tiu metodo sufiĉe similas al "Fenestro", moderna lernilo kun gvidlibro antaŭ kelkaj monatoj eldonita de KEA.

La debaton pri minoritataj lingvoj enkondukis kaj prezidis la subskribinto kiel vicprezidanto de IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) laŭ invito de la LKK. Efike kunhelpis Renée Triolle (sekretariino de UFE kaj membro ankaŭ de IKEL). Ĉar la debato malfermiĝis ankaŭ al la neesperantista publiko (imitinda sperto), ni aŭdis la intervenon de nordkataluna instruisto en la "Bressola" (tiea katalunlingva lernejo) kaj de la help-urbestro s-ro Lluís Lliboutry, mem respondeculo de la kataluna kulturo en la tiea urbodomo. La plenplena salono pruvis ke la temo vekis grandan intereson. Ni povas pozitive resumi la debaton ĉar montriĝis flanke de la esperantista ĉeestantaro tre solidara sinteno kun la rajto de ĉiuj minoritataj lingvoj.

Menciinda estas la sabata arta vespero, kie la "Gajaj Trobadoroj" sub gvido de s-ano Llech Walter, mem ludanto, amuzigis la kongresanaron; ankaŭ folkloro grupo prezentis kelkajn tipajn dancojn kaj je la fino spontana rusa kantistino plene sukcesis ridigi ĉiujn sendistinge pri aĝo kaj sekso.

Je la fino mi diru konklude ke laŭ mia opinio niaj najbaraj samideanoj celas modernigi sian organizan strukturon kaj espereble ili bone sukcesos. Tutkore ni deziras tion

# BRAZILO

De la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto, nunjare, okazis en la brazila ĉefurbo la plej grava jara evento de la tutmonda esperantistaro.

Brazilo estas granda lando kun 8'5 milionoj da kvadrataj kilometroj kaj ĉirkaŭ 120 milionoj da enloĝantoj kiuj malregule distribuigas sur ĝiaj kvar regionoj.

La ĉefa trajto de la brazila enloĝantaro kiu tuj mirigas la vizitanton, estas la tute natura kaj normala miksiĝo de rasoj; tute frate kaj sen rasiaj antaŭjuĝoj kunvivas homoj de blanka, nigra aŭ flava haŭto; estas mirinda ekzemplo.

Specialan intereson meritas la kongresurbo Brazilio. Estas tute nova kaj racie planita urbo kiu naskiĝis nur je la 1960-jaro, elpensita kaj konstruigita de Lucio Costa kaj Oscar Niemeyer sub la instigo de la tia maŝtatestro Juscelino Kubitschek. La ĉefurbo kiu rigardas la venontan jarcenton ŝajnas pensita nur por homoj sur aŭtomobilo; la piediranto preskaŭ ne trovas taŭgan lokon sur la stereotipitaj stratoj kiuj estas racie numeritaj. La publikaj monumentoj: Katedralo, Parla<sup>ment</sup>ejo, Nacia Teatro, la Placo de la Tri Povoĵ, la preĝejo Dom Bosco, ktp kaŭzas egan admiron pro ilia avangarda stilo. Brazilio havas jam 800.000 enloĝantojn kaj preskaŭ 700.000 la ĉirkaŭaj satelitaj urboj. Plejparte de la indikita loĝantaro estas administraj deĵorantoj de la oficialaj centroj de la ŝtato kaj la boristoj kiuj zorgas kaj grandigas la urbon.

Al la kongreso aliĝis 1747 gesamideanoj el 49 landoj kaj 10 el ili venis el Hispanio. Kompreneble la granda amaso estis brazilanoj kaj ni esperas ke la sukceso de la evento ankoraŭ multe kuraĝigos la jam tre aktiva brazila Esperanto-movado. Plezure ankaŭ ni konstatis ke la enloĝantaro simpatie sekvis la agadon de la kongreso pere de la efika televida, radia kaj ĵurnala informado. La plej elstara valoro estis la sindona apogo kaj helpo fare de la naciaj kaj urbaj aŭtoritatoj.

Ne eblas partopreni ĉiujn erojn de UK, sed kompreneble ni ĉeestis la ĉefajn kaj objekte ni provos raporti pri ili: la INTERKONA VESPERO estis brua kiel ĉiam. La SOLENA INAUGURO tre rava kaj kolora, ĉe la inda ejo de la Nacia Parlamentejo, vere alta honoro por la esperantistaro; prezidis la Vic-Prezidanto de Brazilio, D-ro Aureliano Chaves, kaj ĉeestis pluraj ambasadoroj kiuj salutis la kongreson, inter ili ni citu la polan kiu faris belan paroladon en la internacia lingvo. S-ro William Auld prezentis trafan paroladon pri la kongresa temo, KULTUROJ KAJ LINGVOJ: PONTAJ KAJ BAROJ.

La INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO, normale kaj sukcese funkciis. Ni sukcesis ĉeesti la vere interesajn prelegojn de Tibor Sekelj pri EVOLULANDOJ SERĈAS SIAN KULTURAN IDENTECON, ĉefe pri afrikaj landoj; tiun de Werner Bormann pri KULTUROJ KAJ LINGVOJ ĈIRKAŬ EKSTERLANDAJ LABORISTOJ, interesa temo, tre lerte prezentita, pri la gastlaboristoj en Germanio, inter kiuj estas multaj hispanoj kaj laste tiun de Alojzy Wenclewski, FONTOJ DE ANIMALPROTEINOJ EN ZAIRO, bela kaj interesa disertacio pri la juna afrika lando en kies Universitato estas profesoro la preleginto.

La diversaj artaj prezentadoj eltiris la atenton kaj meritis la aplaudon de la kongresanoj: BRAZILA VESPERO, bona prezentado de loka folkloro; ARTA VESPERO, kun bonegaj Esperanto-artistoj, KONCERTO, ktp. La bankedo estis abunda kaj bongusta, la balo tre bruema kiel el la loka muziko.

La diversaj sesioj de UEA, Akademio, Komisionoj, kino, ktp. eltiris la atenton kaj ĉeeston de multaj kongresanoj.

Dimanĉe vespere, ĉe la moderna kaj iom stranga stile Katedralo, okazis la Sankta Meso, kuncelebrita de 5 katolikaj esperantistaj pastroj. La legado, kanto kaj prediko estis en la internacia lingvo. Ĉeestis kelkcentoj da fideluloj.

La du ekskursoj okazis merkrede kaj ilia celo estis akvofalo Itiquira kaj Cristalina, urbeto je 135 kilometroj de la ĉefurbo, urbeto kie okazas la ekspluatado kaj vendado de la plej malsamaj juvelŝtonoj. Ni

partoprenis ĉi tiun lastan kiu iom fuŝis pro la neebleco viziti la minejojn, kaj ĉio konsistis en la vizitado de la lokaj vendejoj kie ĉefe la virinoj longe marĉandis la juvelojn. Dum la kongresa semajno, matene kaj posttagmeze, du ekskursaj vizitoj tra la urbo funkciis, ili daŭris tri horojn kaj ili celis konigi la socikulturajn, arĥitekturajn kaj historiajn trajtojn de Brazilio. La partoprenado estis multnombra.

Por dua fojo okazis aŭkcio favore al la agadoj de UEA. D-ro H. Tonkin tre lerte kaj bonanime direktis ĝin. Estis amuze sekvi la plialtigon de la vendvaloro de la plej diversaj esperantaĵoj. Mi volas citi ke la kongresa afiŝo de Barcelona Kongreso de HEF de la 50aj jaroj, atingis la vendprezon de 800 kruzejoj (proksimume 1 kruzejo egalvaloras 1 peseton). Pere de la aŭkcio oni kolektis pli ol 60.000 kruzejoj.

En speciala kunveno la LKK de Antverpeno prezentis sin kaj skizis la multajn eblecojn de la venonta kongresa urbo. Inter la sciigoj estas la interesa novaĵo ke la belga poŝto, venontjare ankaŭ aperigos Esperantan poŝtmarkon.

Sabate matene okazis la emociiga ceremonio de la sole na fermo de la kongreso: Legado de la rezolucioj, laŭdoj, dankoj, gratuloj, lastaj sciigoj, transdono de la granda flago al la venontjara LKK kaj kanto de La Espero, estis la ĉefaj eroj. Iom malgaje ni disiĝis.

La kongresejo kun la diversaj salonoj, Zamenhof, Privat, Dresden, Silbernik, Hodler, Lorenz, ktp. estis la palaco de kunvenoj de Brazilio, tre ampleksa konstruaĵo kun ĉiuj servoj. La sola malfacilaĵo estis la restoracio kiu ne kontentigis ĉiujn, kaj veturi al la urbo aŭ al la koncernaj hoteloj por manĝi, estis malfacila tasko pro la distanco.

La valoro de la eldonita speciala poŝtmarko estas nur 7 kruzejoj kaj fakte ĝi sola taŭgas por nenia afrankaso, ĉar simpla poŝtkarto al Hispanio jam kostis 45 kruzejoj. Ĉe la poŝta tablo ĉiam estis grandaj vicoj da personoj starantaj. Iom peza afero.

Post neforgesebla semajno pasigita en la suda hemisfero kie Esperanto havas grandan estontecon, ni revenis hejmen feliĉaj pro la fakto ke ni travivis sep tagojn en Esperantio.

Ĝis venontjare en Antverpeno, se eble.

## TEJO-SEMINARIO EN STRASBURGO

Ripetiĝis ĉijare la pasintjara sperto de kelkaj membroj de TEJO: seminario en la Eŭropa Junulara Centro de Strasburgo. Trideko da junuloj el Eŭropo, Orienta kaj Okcidenta, kaj el Nordameriko renkontiĝis dum la lasta semajno de junio por diskuti, en Esperanto, pri iu temo nek esperanta (lingve) nek strikte movada: Nova Internacia Ekonomia Ordo. La temon oni pridiskutis helpe de prelegantoj ne apartenantaj al la Esperantomovado: temis pri junuloj apartenantaj al fakaj organizoj de UNO pri Nova Internacia Ordo, kaj al studentaj movadoj de UNO, krom vjetnamano loĝanta en Germanio: ili prezentis spertojn, organizaĵojn, programojn de tiuj organizaĵoj favore al pli bonaj rilatoj inter la nacioj industriaj kaj evoluiĝantaj, rilatoj ne nur ekonomiaj sed politikaj, sociaj, ĉefe kulturaj. Oni diskutis, do, ĉu tia Ordo vere bezonatas, kiel ĝi povus utili al evoluiĝantaj landoj kaj al industriaj landoj, kiel ĝin realigi, ktp. Krome, oni diskutis la estontan agadon de la Komisiono pri Eksteraj rilatoj (KER) de TEJO, ĉefe cele al kunordigado de la agado ĉe UNESKO en Parizo kaj ĉe la Forumo de Junularaj Organizoj (ne registaraj) en Helsinki kaj Budapeŝto: oni devas tamen diri ke tiu flanko estis duaranga dum la Seminario. Fakte, gravas diri ke oni diskutis EN Esperanto, ne PRI Esperanto: tion oni taksas gravan paŝon antaŭen por la junulara movado, kiu montras sian emon UZI Esperanton kiel komunikilo, kaj ne nur pri "verda" abstrakta idealo. Tiacela TEJO-agado ŝajnas esti unu el la plej bonaj propagandaj kaj agadaj starpunktoj dum la lastaj tempoj: ni ĉiuj estas alvokataj helpi tion, por ke Esperanto fariĝu pli kaj pli "ĉiutage kaj ĉiuteme uzata" lingvo.

Norberto Saletti  
(Italio)

# Korespondemas...

... 22-jaraĝa estona filologia studento kiu interesiĝas pri kastilia lingvo: Vello Raasman / Sihi 115-1 Tallinn-16 / Estonio / Sovetunio.



## KION DONACI AL VIAJ KORESPONDANTOJ?

Ni sugestas al vi la libron pri la 18aj Internaciaj Floraj Ludoj de nia kataluna movado, okazintaj en Tortosa en 1978 en la kadro de nia 20a Kataluna Esperantista Renkontiĝo.

Ĝi reprenas la tradicion kiun tragike fortranĉis la hispana intercivitana milito. Ĝia enhavo estas la jena:

Antaŭparolo de Llibert Puig i Gandia  
Verdikta memuaro de la Sekretario Gabriel Mora i Arana  
Festparolado de la Prezidanto Manuel Casanoves i

Premiitaj verkoj:

El Taglibro por Kristina (Kris Long) Natura Floro  
Tenera Saŭdado (Reto Rossetti) Unua Subpremio  
Marborde (Zora Heide) Dua Subpremio  
Stranga Sonĝo (Simeon M. Simeonov) Jasmeno  
Rita (Lina Gabrielli) Violo  
Ĉi-nokte (J. Balbin) Unua Subpremio  
Memoraĵoj el Pompejo (B. Golden) Premio Originala Prozo  
Onia meditado (G. Moya) Unua Subpremio  
Luna Nokto (O. Knichal) Dua Subpremio

Dankparolado de Petro Nuez

Prezo: 200 p-toj.

## REE PRI NIA BULTENO

Se vi, kara kunmembro, deziras facile informi viajn korespondantojn pri la agado de la sabadella movado, abonu por ili nian bultenon kiun rekte ni pretas sendi al ili.

Tio kostos al vi 300 p-tojn jare por transsendo ene de Eŭropo kaj 400 p-tojn por aliaj kontinentoj.

Simpatia kaj malmultekosta donaco, kiun alte estimos viaj eksterlandaj geamikoj.

---

... antipoda poŝtmark- kaj monerkolektanta dek-unu-jara knabino kiu petas rapidan respondon: Megan Leggo / 87 Cooranga Rd. / Mandurah 6210 / Western Australia.

# GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

1906·1981



Nia lingvo ankoraŭ ne aĝas 100 jarojn. Estas do, tre oportune festi la 75-jaran ekzistadon de esperanta asocio.

Tiel okazis en Bilbao, kaj la tiea Grupo prave decidis organizi internacian renkontiĝon, kiu reliefigu tiun eventon.

Jen, de la 18a ĝis la 21a de junio kunvenis esperantistoj el diversaj lokoj kiel Santiago de Compostela, Logroño, Madrid, Zaragoza, Valladolid, Palencia kaj Bilbao mem. Ni konsideru la bedaŭrindan 'internaciecon' de la aranĝo pro la partopreno de homoj nur en la maj de la hispana ŝtato. Francoj kaj portugaloj estis ŝajne ĉeestontaj, sed lastmomentaj kialoj nebligis tion.

Nu, kiel vi povas rimarki pro la devenlokoj, alia lingvo ol la internacia estis facile uzebla en tiaj cirkonstancoj, kaj pleje tio okazis.

La programo normale kaj kontentige disvolviĝis. Mi priskribu ĝin iomete:

- Projekcio de esperantaj filmoj. Temis pri turismaj norvegaj reklamiloj. Sekvis filmeto pri la restarigo de la postmilita Bilbao'a movado, kie oni povis rimarki la kruelajn efektojn de la tempopaso ĉe kelkaj vizaĝoj.
- Omaĝo al la veteranoj. Emociiga estas la fakto vidi maljuniĝintajn homojn, kiuj portas vigle la samajn idealojn malgraŭ la korpaj malhelpoj. Danke al ili eblas festi tiun ĉi eventon.
- Urbodoma akcepto. Laŭ tradicia kutimo, kun la speciala aldono de donaco de memoriga arĝenta plado fare de la urba konsilantaro.

- Kastililingva konferenco de D-rino M. Rafaela Urueña pri la "Alporto de Esperanto al la minori tataj lingvoj". Vere majstra kaj universitatnive la. Manko pri kiu ne kulpas la parolintino: la parolado konvinkis nur la konvinkitojn, ĉar aliaj ne ĉeestis.
- Ekskurso al Gernika. Kutima itineraro laŭ pejzaĝaj kaj historiaj lokoj. Tro longa haltotempo en Gernika.
- Disdono de insignoj al kursfinintoj kaj esperanta debato antaŭis lunĉon, kiu fermis la Renkontiĝon. Rimarkinde granda estis la nombro de kursfinintoj kaj ilia juneco. Ili ne parolas Esperanton, sed tio okazas ankaŭ ĉe multegaj esperantistoj. La ebleco okazigi esperantlingvan publikan debaton estis surprizo por mi, al kutimiĝinta forgesi pri nia lingvo dum Bilbao'aj kunvenoj.

Kelkajn konkludojn mi citos pri miaj impresoj.

Rilate internan plifortigon, ŝajnis al mi bedaŭrinde neefika tiu ĉi Renkontiĝo. Dum mia Bilbao'a aktivado mi konis plurajn homojn, pli-malpli aktivajn. Malmultaj el ili sentis la neceson rememori aŭ vigligi rilaton al asocio, kiun ili devus senti kiel sia.

Laŭ la entuziasmaj kaj laboremaj lokaj organizantoj, la ekstera efiko estis alta, ĉu per radio, televido, ĵurnaloj, dulingva ekspozicio, ĉu per atentigo de urbaj kaj deputitejaj instancoj.

Tamen, ekzistas io manka en la Bilbao'a Grupo: ĝia principa nevaskeco, devenanta de la neetnolingva konsisto de la Bilbao'a loĝantaro. Ja ne multe eblas fari pri tio en tia medio, kaj ne ekzistas esperantistoj en vasklingvaj regionoj. Etnolingva publiko vidas en esperanto malamikon, kaj kastililingva esperantistaro certe ne povas konvinki ilin pri la malo. Do, KEA viglas, sed "VEA" utopias.

Mi finu per anekdoto: galego kaj vasko krokodilis katalune.

Miquel Àngel Altuna



De la 17a ĝis la 22a de julio, okazis en Murcio la nunjara HEF-Kongreso. Ĝin inaŭguris en la tiea Universitato, ties Rektoro, Prof. J.A.Lozano, kiu per simpatiaj vortoj, esprimis sian senton de solidareco kun la E-Movado. Post li parolis Katedra profesoro pri Kemia Fiziko, samideano A. Serna Serna, Prezidanto de LKK, kiu i.a. aparte akcentis la grandan eĥon, kiun havis la Kongreso en la tuta regiono, kion pruvas, li diris, la konstanta ricevo de amaso da korespondaĵo petanta informojn pri Esperanto. Sekvis la oficiala salutado de la enlandaj grupdelegitoj, el kiu estas distinginda la emociaj vortoj, en Esperanto, de s-ino Ana María Hernández-Ros Codorniu, nepino de la fama esperantista pioniro Ricardo Codorniu Stárico, fondinto de Esperanto-Grupo en Murcio kaj ankaŭ de la iama "Hispana Societo por propagando de Esperanto". (Eble estas sciinde, ke en Murcio staras monumento lia en centra placo, kaj ke lia nepo, s-ro Juan de La Cierva Codorniu, inventis la aŭtogiron). Ankaŭ tiuokaze s-ano S. Aragay, nome de KEA, invitis ĉiujn kongresanojn ĉeesti, en Moia, la 23an Katalunan Esperantistan Renkontiĝon. Tuj poste, la HEF-sekretario, s-ano L. Hernández García legis ĉiujn ricevitajn kongresaliĝojn, inter ili, tiun de "Centro de Esperanto Sabadell". Ankaŭ persone salutis jenaj eksterlandaj partoprenantoj: s-ano Sergio Docal Puig, el Usono; s-anino Koleva Pavlova, el Bulgario; s-ano Freire de Oliveira, el Portugalio; s-ano Norberto Saletti, el Italio; s-anino Kalina Pienkiewicz, el Pollando (ĉiuj kvin jam konataj en Sabadell). Krome salutis reprezentantoj el Francio kaj Svislando. Fine, la HEF-Prezidantino M. Rafaela Urueña, deklaris la Kongreson aperta.

Ekster la kutimaj kongres-programeroj, oni nunjare organizis: projekcion de norvegaj filmoj en Esperanto, kaj koncerton el diversstipaj kanzonoj, kiujn majstre kantis, akompanante sin mem per gitaro, svisa esperantisto s-ano Olivier Tzaut. Krome, oni povis spekti Esperanto-teatron, la trian fojon en la kadro de hispana kongreso, danke al la iniciato de la talentaj geaktoroj polaj, Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński, kies prezento -same kiel okazis en Sabadell, jam la jaron 1977- merite atingis varmajn aplaŭdojn de la publiko.

Tre interesaj ankaŭ fariĝis la du enprogramitaj prelegoj, unu en kastilia lingvo, fare de Katedra Profesoro pri Literatura Kritiko en la Universitato de Murcio, s-ro Antonio Roldán, kiu sukcesis longe teni la atenton de la ĉeestantoj, per sia tre dokumentita lekcio prilila fama Albacete-devena verkisto Sotos Ochando, aŭtoro de internacilingva projekto. La alian prelegon pri la relativec-teorio de Einstein, kun posta kolokvo, tre kompetente disvolvis, en bonega Esperanto, la galega licenciulo pri matematiko, s-ano Antonio Alonso Núñez, profesoro de la Esperanto-kurso de "Instituto de Idiomoj" (Filologia Fakultato de la Universitato de Santiago de Kompostelo).

En ĉiuj kunvenoj dumkongresaj, onin agrable surprizis la esperiga fakto, ke freŝaj rondetoj de viglaj gejunuloj diversoriginaj, precipe el centra kaj suda landpartoj, fervore interesiĝas pri la Movado, alportante al ĝi sian pozitivan kunlaboradon. Ankaŭ la veteranoj alportis sian sableron al la Kongreso. Aparte menciinda ĉi-loke la optimisma agado de junkora, de ĉiuj estimata samideano. Temas pri nia kataluna amiko Frederiko Alberich, la ĉiam servopreta, ĉiuhore respektete ŝercema aktivulo. Danke al lia multifaceta distrokapablo, ĉiunokte okazis eksteroficiala rendevuo en la ĝardeno de la Universitato, en kies areo troviĝis la restadejo de preskaŭ ĉiuj kongresanoj. Kun ĝojo oni aŭdis tie varian repertuaron, el kies roluloj la subskribinto memoras la namojn de Fernández Jurado, Zaragoza, Arnau, Martí... La juneca Alberich fariĝis la gvida animanto de tiuj amuzaj noktoj. Lia stoko da spritaĵoj kaj ridigaj anekdotoj neniam elĉerpiĝis!

Post la diversaj labor-kunsidoj, je la lasta tago de la Kongreso oni konigis ties seppunktan rezolucion, kiu tekstas jene: 1. Akcepti la proponojn de la Grupoj Esperantistaj de Malago kaj Seviljo, por organizi en tiuj urboj Hispanan Kongreson de Esperanto, la jarojn 1982 kaj 1984 respektive. (Kiel sciante, tiu de 1983 okazos en Zaragozo); 2. Esprimi dankemon al la Regiona Konsilio de Murcio pro ĝia helpo al la Kongreso, helpo precipe valora por la turisma eldono en Esperanto pri Murcio kaj ties regiono; 3. Peti al la koncernaj instancoj la eldonadon de turismaj broŝuroj en Esperanto, konforme al la rekomendo de la Fina Akto de la Internacia Konferenco pri Turismo, okazinta en Manilo, la jaron 1980; 4. Klopodi, ke en la Hispanaj Kongresoj, oni destinu monparton el ĝiaj enspezoj por artaj kaj kulturaj celoj, kion ankaŭ oni proponu al UEA por ties Internaciaj Kongresoj; 5. Konsiderante la pozitivajn rezultojn atingitajn rilate al la disvastigo de Esperanto en la edukajn mediojn, daŭrigi kaj intensigi tiun agadon je ĉiuj niveloj. 6. Profitante, ke en Hispanio okazos venontjare la Tutmonda Ĉampion-Konkuro de Futbalo, peti al ĝia Organiza Komitato la enkondukon de Esperanto, kiel plian lingvon de informado, kaj la starigon de sekcio de Esperanto-interpretistoj; 7. Danki la ĵurnalismajn mediojn, pro ilia atento ĝuste informadi pri la Kongreso.

Fine, post distribuo de libro-premioj al kelkaj aktivuloj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kaj liverado de diplomoj al la sukcesintaj gelernantoj de la Esperanto-kursoj, oni donacis la nunjare aljuĝitan "Premio Klara Silbernik" al belga esperantistino, loĝanta en Callosa de Segura (Alacant), s-anino Josette Braem, edzino de la tre aktiva instruisto prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Direktoro de la perkorespondaj Esperanto-kursoj de ILEI, danke al kies pozitiva agado nuntempe troviĝas esperantistoj, precipe instruistoj, en pluraj lokoj de Hispanio, ĉe kiuj neniam antaŭe estis brilanta la verda stelo. Last vice, per tre objektivaj vortoj de la Prezidantino de HEF, s-anino M. Rafaela Urueña, kunvokante la ĉeestantojn al la venontjara Kongreso, en Malago, ŝi deklaris la 41an Kongreson fermita.

Sabadellano

# El la Redakcio

Gratulon! Vi, kuraĝa leganto(ino), preskaŭ jam sukcesis travori tiun densan literan ĝangalon, kies intereso enhavo ŝvitigis viajn avidemajn okulojn. Ripozu momenteton, spiru profunde kelkfoje kaj sprintu. La fino troviĝas jam ĉe la alia flanko de ĉi-folio.

òpc

## 2 a TENDARO

de

JOVENTUT  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
JUNULARO

### Sabate la 26an

- Ekde la 19a h. Alveno de la partoprenantoj.  
Muntado de tendoj.
- Je la 21,30a h. Kolektiva vespermanĝo (ĉiuj kune sed ĉiu sian).
- Je la 22,30a h. Nokta ludo meze de senluma arbaro.
- Je la 24a h. Ĉirkaŭfajrumo.

### Dimanĉe la 27an

- Je la 3a h. Horloĝojn al la 2a.
- Je la 5,05a h. Festado de la 75 horoj de la ĉi-jara aŭtuno (nur por la plenaĝuloj).
- Je la 8a h. Veko.  
Malmuntado de la tendaro.
- Je la 9a h. Ekskurso al Moià por partopreni la 23an Katalunan Esperantistan Renkontiĝon (vidu programon sur la lasta paĝo)

Ĉiuj aranĝoj -krom la lasta programero kiu okazos sur voje- okazos en bela arbaro "El Prat" kiu troviĝas sufiĉe proksime de Moià.

## 23A KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

Moià (Moianès, Bages) - 26a kaj 27a de septembro 1981

### PROGRAMO

Ĉiuj aranĝoj okazos en la Kulturdoma Aŭditorio de "La Caixa" (ĉe la Municipa Parko) escepte de tiuj, kies loko estas speciale indikita en la koncerna programero.

#### Sabate la 26an

Ekde la 18a h. Inaŭguro de du ekspozicioj:

1. Pri infandeseĝnaĵoj de la tuta mondo, kolektitaj de s-ano Ramon Molera per Esperanto.
2. Pri la uzo de Esperanto en la diskonigo eksterlande de la lingvo kaj kulturo katalunaj.

Tuj sekve: Publika Esperanto-leciono gvidata de s-ano Petro Nuez.

Ekde la 19a h. En proksima arbaro "El Prat": 2a Tendaro de Kataluna Esperanto-Junularo (vidu programon sur paĝo 15).

#### Dimanĉe la 27an

Je la 9a h. Akceptado de la gepartoprenantoj kaj disdono de dokumentoj kaj insigno.

Je la 10a h. Prezento de la teatraĵo "La aminda kretenino" fare de La Krizalido (Teatro Internacia de Akvitano).

Je la 12a h. Akceptado en la Urbodomo.

Je la 13a h. Disvolviĝo de la 21aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ. Festparolos Ada Fighiera-Sikorska, Redaktorino de Heroldo.

Je la 14,30a h. Komuna tagmanĝo en la restoracio Montvi de Baix. (Prezo: 600 p-toj). Dum la tagmanĝo okazos aŭkcio de kelkaj ne oftaj esperantaĵoj.

Je la 17,30a Denove en la Aŭditorio de la Kulturdomo okazos prezento de diapozitivaj pri la UK en Brazilo fare de s-ano Ramon Molera.

Je la 9a h. Katolika diservo en E-o okazos en la Paroĥejo Sta. Maria fare de Pastro Manuel Casanoves CMF.